

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaudon la 2-an de septembro 2021 per Zoom

Ĉeestis:

Bård Hekland, Jardar Eggesbø Abrahamsen, Lars Sandbakk, Vidar Skretting, Marianne Lund

1. Tagordo

Oni aprobis la tagordon.

2. Prezento de la estraranoj

Ne necesis nova prezento, ĉar ne ĉeestis novuloj.

3. Protokolo de la kunsido 12.08.2021

La protokolo de la pasinta kunveno jam aprobiĝis rete. Neniu deziris aldone komenti ĝin.

4. Ŝanĝoj ĉe Brønnøysund-registroj.

Marianne prizorgis la registradon de la ŝanĝoj ĉe Brønnøysund-registroj. Ĉio ŝajnas esti en ordo, krom ke la nomo de Mario Machlik daure aperas inter la subskribantoj kaj prefere estu anstataŭigita per la nomo de Bård Hekland.

5. Nova retroŝta servilo. Ĉu io estas farita de la pasinta kunsido?

Jardar sendos mesaĝojn al la NJE-listo kaj al NEL-diskut pri malfondo de tiuj du listoj ene de kelkaj monatoj. Se neniu protestos, ni efektiviĝos la decidon fermi ilin.

6. Gazetara komunikado, loke adaptita.

Bård sendis noticon al tri lokaj gazetoj, Marianne al du. Lars faros same. Venis neniu reago de la gazetoj ĝis nun.

7. Spond. Nova ilo por interna komunikado kaj membromastrumado. Rezultoj de elprovado.

Ni decidis provuzi Spond dum iom pli longa periodo, enmetante realajn membroinformojn.

Ĉiuj estraranoj, kiuj jam membras en nia Spond-grupo, estas nun administrantoj.

Lars provos trovi manieron fari adresetikedojn en Spond. Same, ni devos trovi manieron registri kotizpagojn post diversaj manieroj de pago.

Malgrau transpagaj kostoj je 2,5 % ni opinias, ke indas uzi Spond eĉ el ekonomia vidpunkto, interalie pro la facileco administri kotizpagojn.

Lars kaj Vidar verkos norveglingvajn informojn pri nia ekuzo de Spond por la venonta numero de Norvega Esperantisto.

8. La grandaj ŝanĝoj ene de UEA. Ĉu ni havas opinionon?

Bård mallonge priskribis, kaj ni diskutis, la proponojn de la estraro de UEA, interalie pri vendo de Centra Oficejo, transigo de la biblioteko Hodler al Austria nacia biblioteko kaj pri transdono de pluraj gravaj funkcioj al E@I en Slovakio. Ni bedaŭras la malfacilan situacion

kiu ekestis en UEA, sed sentas, ke malfacilas havi firman opinion pri la proponoj, ne konante eventualajn alternativajn solvojn de la ekonomiaj problemoj de la asocio. Tamen, la decidproceduro ŝajnas al ni kritikinda, i.a. pro malfrua dissendo de dokumentoj al la komitatanoj.

Ni decidis, ke Bård demandos al Kjell Peder Hoff (UEA-komitatano de NEL), ĉu li ricevis pliajn dokumentojn kun pliaj klarigaj informoj. Ni intencas inviti Kjell Peder al parto de estrara kunveno por kune diskuti la aferon.

9. Skiza laborplano por 2021-22

Same kiel dum niaj du lastaj kunvenoj mankis tempo por profunde diskuti la estontan agadon, do ni prioritatis pritrakti du temojn:

- Skandinava kongreso

Ni apogas la proponojn, priskribitajn en leteroj de niaj danaj kolegoj, kiuj pretas organizi skandinavon kongreson sur la pramŝipo inter Oslo kaj Kopenhago. Por posta okazo ni konsideru, ĉu proponi kunveni en Esperanto-Gården en Lesjöfors.

- Reta seminario

Ni decidis organizi retan seminarion per Zoom fine de novembro. Ĉar la du lastaj seminarioj pritraktis movadajn temojn, eble ĉi-foje estu faka seminario pri alia temo, ekzemple pri la stato de la norvega lingvo en universitatoj kaj esplorinstitutoj.

10. Propono de UEA pri UNESKO-tago

Prokrastiĝas.

11. Eventualajoj:

Altigo de la luprezo en Esperantonia.

La altigo de la luprezo estas neinfluebla fakto, kiun ni devas akcepti, posedante la oficejon. La ekonomia malbonstato de NEL nun tamen ne ŝajnas esti tiom serioza, ke ni tuj iniciatu grandan agadon, ekzemple petante donacojn de la membroj por kovri la aldonajn elspezojn. La estraro devos prepari diskuton pri la sorto de nia oficejo por la venonta landa kunveno.

12. Venonta estrara interkonsiliĝo

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaudon la 7-an de oktobro je 20.00 per Zoom.

Protokolis Marianne Lund